Propono de membriĝo de la FEB en kulturdomo de Esperanto, kastelo Greziljono

Pluraj membroj de la federacio estas tre aktivaj en la kulturdomo de Esperanto kiu situas en kastelo Greziljono en Baugée-en-Anjou. La kastelo estas sufiĉe proksima de nia regiono kaj de longe rolas grave por bretonaj esperantistoj kiuj ofte ferias tie por plibonigi sian Esperanto-nivelon, trapasi ekzamenojn kaj ĝui la kulturajn eventojn organizitajn tie.

Dum la dek lastaj jaroj la kulturdomo retrovis kreskon de agadoj kaj financoj dank' al luado al ekstera publiko kaj pli ampleksa programo kun almenaŭ tri aŭ kvar semajnoj somere, unu semajno aŭtune kaj unu printempe.

***Unua propono**: la FEB fariĝu societano per aĉeto de unu socia parto A de 16 eŭroj.*

La kulturdomo estas kooperativo kiu bezonas homajn kaj financajn rimedojn por daŭra kresko por sia estonteco. Ĉi cele, ni proponas ke la federacio fariĝu societano de la kulturdomo, tio eblas ne nur por homoj sed ankaŭ por asocioj. Por fariĝi societano, necesas nur pagi unu socian parton A je la prezo de 16 eŭroj. Tio alportas eblecon partopreni al la membrokunveno de la kulturdomo nome de la FEB kaj eblecon kandidatiĝi nome de le FEB por la komitato kiu administras la kulturdomon.

***Dua propono:** la FEB povu aĉeti B-partojn de 200 eŭroj estonte.*

Se la unua propono estas aprobita ni proponas ke estonte la FEB povu subteni finance la kulturdomon, per aĉeto de B-partoj de 200 euroj por tiel kreskigi la kapitalon de la kulturdomo ebligante pliajn renovig-laborojn por kreskigi la utiligeblecon de la loko kaj daŭrigi ĝian valoron. Ni proponas ke aĉeto de tiaj B-partoj povos okazi kaze de profito de la FEB konstatita fine de la konto-jaro kaj post decido de la membrokunveno, aŭ okaze de donacoj faritaj de membroj tiucele post decido de la komitato.

Ni precizigu ke se iuj deziras rekte helpi finance la kulturdomon per donaco, tio eblas sed ĉar la kulturdomo estas kooperativo, ĝi estas leĝe konsiderita kiel entrepreno kaj ne rajtas doni donac-ateston. Per donaco al la FEB por aĉeto de B-partoj, donacemuloj povos ricevi tiajn ateston por redukti impoŝton. Impoŝtpagantoj povos tiel helpi pli.

Indas ankaŭ kuraĝigi homojn aktive partopreni al la funkciado de la kulturdomo. Se vi jam ofte iras tie, fariĝu societano por fortigi la homan komunumon kiu vivtenas la kulturdomon!

Proposition d'adhésion de la FEB à la maison culturelle de l'espéranto, château de Grésillon

Plusieurs membres de la fédération sont très actifs dans la Maison culturelle de l'espéranto (MCE) qui est située au château de Gresillon à Baugée-en-Anjou. Le château est assez proche de notre région et joue depuis longtemps un rôle important pour les espérantistes bretons qui y passent souvent des vacances pour améliorer leur niveau d'espéranto, passer des examens et profiter des événements culturels qui y sont organisés.

Au cours des dix dernières années, la MCE a retrouvé une augmentation de ses activités et de ses finances grâce à la location au public extérieur et à un programme plus complet avec au moins trois ou quatre semaines en été, une semaine en automne et une au printemps.

***Première proposition:** que la FEB devienne sociétaire en achetant une part sociale A de 16 euros.*

La MCE est une coopérative qui a besoin de ressources humaines et financières pour sa pérennité. À cette fin, nous proposons que la fédération devienne membre de la MCE, ce qui est possible non seulement pour les particuliers mais aussi pour les associations. Pour devenir membre, il suffit de payer une part A au prix de 16 euros. Cela donne la possibilité de participer à la réunion des membres de la MCE au nom de la FEB et de se présenter au nom de la FEB pour le comité qui gère la MCE.

***Deuxième proposition:** la FEB pourra acheter à l'avenir des parts B de 200 euros.*

Si la première proposition est approuvée, nous proposons qu'à l'avenir la FEB puisse soutenir financièrement la MCE, en achetant des parts B de 200 euros pour augmenter le capital social de la MCE permettant de nouveaux travaux de rénovation pour augmenter les possibilités d'utilisation du lien et préserver sa valeur. Nous proposons que l'achat de ces parts B puisse avoir lieu en cas de bénéfice de la FEB constaté à la fin de l'exercice comptable et après décision de l'assemblée des membres, ou en cas de dons effectués par les membres à cet effet après décision du comité.

Précisons que si certains veulent aider financièrement directement la maison de la culture par un don, cela est possible mais la MCE étant une coopérative, elle est légalement considérée comme une entreprise et n'est pas habilité à émettre des reçus fiscaux. En faisant un don à la FEB pour l'achat de parts B, les donateurs pourront recevoir un tel reçu donnant droit à réduction d'impôt. Cela permettra de contribuer davantage.

Il convient également d'encourager les habitués du château de Grésillon à prendre une part active à son fonctionnement. Si vous y allez souvent, devenez sociétaire pour renforcer l'équipe qui fait vivre la MCE !